

1
Por na informo kaj eventuala reago!

Kalmthout, 10-09-1992

PETO

Mi sendas ĉi-kune al vi kaj al kelkaj aliaj aktivuloj proponon pri eldonado de nova serio de informbroŝuroj kun la peto tralegi ĝin kaj komuniki al mi viajn kritikojn, sugestojn, rimarkojn, amendojn.

Bonvolu menciigi ĉu vi eventuale konsentas kunlabori en la projekto, kaj se jes, kiamaniere. Nomoj de aliaj eblaj kunlaborantoj estas bonvenaj !

Se ekzistas interkonsento pri la principo mem kaj iu enkonduka teksto, ni povus diskonigi la projekton larĝskale por informi la esperantistaron kaj tiel prepari 'merkaton'.

Bonvolu aparte pripensi la problemon de la eldonisto : ĉu lanĉi ĝeneralan demandon de prezoferto al multaj eldonistoj, al nur kelkaj en diversaj landoj, al nur unu ? Por fari tion, mi supozas ke ni devas atendi ĝis almenaŭ unu broŝuro estos preta.

Elkoran dankon por via eventuala kunlaboro !



Edward Symoens
Putsesteenweg 151
B-2920 Kalmthout
Tel. 03/666 62 66

Propono : eldonado de popular-sciencaj informbroŝuroj.

1. Pravigo

Ĉiuj esperantistoj konstatas en sia rutina, ĉiutaga kaj laŭokaza informlaboro ke ofte mankas taŭgaj rebatargumentoj kaj respondoj al ofte revenantaj kontraŭargumentoj. Ja ekzistas i.a. broŝuro de Claude Piron en kiu troviĝas pluraj valoraj respondoj al multaj demandoj. Iuj tamen estas traktitaj ne sufiĉe funde por lingvo-spertuloj, aliaj mankas.

2. Propono

Anstataŭ kolekti ĉiujn argumentojn en unu sola verko, mi proponas eldoni novan allogan serion de broŝuroj, aboneblaj kolektive aŭ aĉeteblaj unuope, kiel ekz. en la jaroj tridekaj la Muusses Esperanto-Biblioteko en Nederlando.

La broŝuroj ne estus ampleksaj, sed koncize traktus surbaze de nerefuteblaj faktoj kaj mencio de seriozaj fontoj ĉiujn argumentojn, kiujn ni regule aŭdas aŭ legas pri Esperanto.

La avantaĝo de unuopaj broŝuroj, ne tro multekostaj sed tamen belspektaj, estas ke ni eventuale povus sendi al korespondanto, al iu gravulo, iu interesita profesiulo nur la koncernan broŝuron, kaj ne kompletan kolekton de respondoj.

3. Kelkaj ekzemploj

- 3.1 "Esperanto ekzistas jam pli ol cent jarojn kaj tamen ne sukcesis imponi al la amasoj nek al la registaroj nek al la lingvo-profesiuloj !"
(Ni povus analizi tiujn cent jarojn : diskoniga periodo, du mond-militoj, diktatoraj persekutoj, ktp.; kompari kun aliaj grandaj ideoj en la historio...)
- 3.2 "Esperanto ne estas ligita al nacio, al vivanta popolo ; ĝi ne estas gepatra lingvo..."
(Ni priskribu la diasporan E-komunumon, la ekziston de E-geedzoj, la ekziston de denaskaj esperantistoj, ktp.)
- 3.3 " Esperanto estas artefarita lingvo, do ne povas funkcii kiel la naturaj lingvoj."
(Ni komparu ĝin kun la t.n. naturaj lingvoj, kiuj en iu periodo de sia evoluo kaj estiĝo estis konsiderataj kiel artefaritaj, kiel atestas multaj lingvistikaj fontoj)
- 3.4 " Esperanto ne havas kulturon !"
(Ni analizu la nocion 'kulturo' kaj pruvu per multaj ekzemploj ke Esperanto ja havas sian propran kulturon, sed ke ĝi ankaŭ estas peranto inter multaj kulturoj)
- 3.5 " Ni ne bezonas Esperanton ; la angla jam estas la moderna internacia lingvo". (Ni analizu , surbaze de esploroj kaj dokumentoj, la veran situacion de la angla , la rolon de nacia kaj internacia lingvo , la naciismaj reagoj kontraŭ la hegemonia de unu nacia lingvo, ktp., sen kia ajn atako de la angla !)
- 3.6 " Esperanto endanĝerigus la nacian identecon de la popoloj kaj ties lingvojn."
(ni montru ke la malo veras, pro ĝia neŭtraleco, ĝia transnacieca karaktero ; ni klare montru la lokon de Esperanto apud la aliaj lingvoj)

Rimarko : ĉi tiu listo estu kompletigota de ĉiuj aktivaj esperantistoj, kiuj el propra sperto, povas citi aliajn demandojn, argumentojn, al kiuj ni trovu taŭgajn, adekvatajn nerefuteblaj klarigojn.

4. Aliaj kunligitaj temoj rilate al informado ĝenerale.

En la sama, aŭ en paralela ekz. alikolora serio, ni aperigu klarigajn informojn pri Esperanto. Pluraj ekzistas en eldonaĵoj de UEA aŭ de landaj asocioj, sed ili ofte ne estas sufiĉe konataj aŭ malhaveblaj. Kelkaj ekzemploj.

4.1 "La Esperanto-Centroj en la Mondo."

(Ni priskribu la agadon kaj la rolon de tiuj Centroj, montrante samtempe la universalecon de Esperanto kaj la similecon kun la Centroj de la grandaj naciaj kulturorganizaĵoj kiel British Council, Alliance Française, Goethe Institut, k.a.)

4.2 " Bazaj faktoj pri Esperanto "

(La broŝuro ekzistas, sed estas tute ne ĝisdatigata kaj eble ne plu havebla).

4.3 " Kiuj estas en la socio kaj la komunumo la loko de kaj la rilatoj inter la noioj : loka, regiona, nacia, internacia, supranacia, transnacia, translima, universala, monda, kosmopolita."?

4.4 " La propedeŭtika valoro de Esperanto kadre de nova lingvopolitiko".

4.5 "Planlingvoj kaj 'naturaj' lingvoj." Enkonduko.

4.6 "Interlingvistiko kaj lingvistiko : priskribo de la laborterenoj"

Rimarko : ankaŭ ĉi tiu listo estas kompreneble kompletigenda.

5. Praktikaj konsideroj kaj demandoj

5.1 Redakta komisiono

Ĉi tiu konsistus el kvar aŭ kvin spertuloj/lingvistoj/interlingvistoj / spertulo pri informado, kiuj prijuĝus la elektitajn temojn, serĉus kompetentajn verkistojn, pritaksus la manuskriptojn.

5.2 Eldonejo

Ĉar la broŝuroj estu ne tro multekostaj, ni eble serĉus eldoniston en lando, kie la eldonkostoj estas plej malaltaj.

5.3 Tradukoj

La serio aperus en Esperanto, sed ĉiuj broŝuroj ankaŭ aperus en kiel eble plej multaj naciaj/regionaj lingvoj. Ni do devas konsistigi reton de kompetentaj kaj fidindaj tradukantoj. Praktika problemo : kiu eldonus la tradukitajn versiojn ? Ĉu ĉe la sama eldonisto aŭ en la unuopaj naciaj landoj ?

5.4 Financaj aspektoj

Kie trovi la komenckapitalon por eldoni la unuajn broŝurojn ? Ĉu kompenzi la aŭtorojn ? Kie troviĝus la stoko kaj kiu prizorgus la forsendon de la menditaj broŝuroj ?

5.5 Publikeco

Ĉi tiu okazu grandskale, pere de ĉiuj disponeblaj kanaloj.